

John Ellerton,  
The day Thou gavest,  
Lord, is ended

John Ellerton,  
Ni estis ja en ma-  
no Dia

*tradukita de Manfredo Ra-  
tislavo*

1. The day Thou gavest, Lord, is en-  
ded,  
The darkness falls at Thy behest;  
To Thee our morning hymns ascen-  
ded,  
Thy praise shall sanctify our rest.

1. Ni estis ja en mano Dia,  
dum brilis super ni la  
Sun'.  
Protektu nin per mano  
Via  
dumnokte, Dio, ankaŭ  
nun!

2. We thank Thee that Thy church,  
unsleeping,  
While earth rolls onward into light,  
Through all the world her watch is  
keeping,  
And rests not now by day or night.

2. La ter' cirkulas ĝis la ve-  
no  
de l' nova tag', ripozas ni  
dum tiu nokt' en Via be-  
no<sup>2</sup>  
ĝis la mateno, kara Di'.

...

...

John Ellerton,  
Du lässt den Tag, o  
Gott, nun enden

*tradukita de Raymund Weber*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio  
estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis ti-  
on.

...

John Ellerton,  
Forpasis tiu tag',  
Sinjoro

*tradukita de Frieder Wei-  
gold*

1. Forpasis tiu tag', Sin-  
joro,  
Kaj profundiĝas la sen-  
lum'.  
Vi gardis nin de ajn do-  
loro.  
Nin gardu ankaŭ dum  
noktum'!

2. Ni rotacias en la tagon.  
En nokta paco dormas  
ni.  
Kaj portas lumon trans  
la maro  
La suno, kie brilas ĝi.

...

John Ellerton,  
Finiĝas nun alia  
tago

*tradukita de William  
John Downes*

1. Finiĝas nun alia tago,  
jam venis la vespera hor'.  
Kunvenis ni por adorago  
plaĉanta al la Di-Sinjur'

2. Ni dankas Vin, Savan-  
to nia,  
ke sur la tuta mond-  
teren'  
la sankta eklezio Via  
staradas firme ĉe posten'.

...

<sup>2</sup>aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

<p>3. As o'er each continent and island The dawn leads on another day, The voice of prayer is never silent, Nor dies the strain of praise away.</p>	<p>3. Nun kiam en malhel' fordronas la Sun' en tiu ĉi vesper', multvoĉe Via laŭdo sonas alialoke sur la Ter'.</p>	<p>3. Senĉese kiel la mateno Briladas super tera rond', Eksonas laŭdo pro la be- no Al ĉiu sur la vasta mond'.</p>	<p>3. Ruliĝas tero, brilas lu- mo de ne-ĉesanta maten- glor'. Leviĝas laŭdo, preĝ- parfumo konstante, kiel dolĉe- odor'.</p>	
<p>4. The sun that bids us rest is waking Our brethren 'neath the western sky, And hour by hour fresh lips are ma- king Thy wondrous doings heard on high.</p>	<p>4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta la Teron lumo de l' ma- ten', senĉese estas plusonanta preĝado de la homoj jen.</p>	<p>4. La suno, kiu ĵus subi- ris, Ja brilas en plu fora land'! La gloron, kiun ni admi- ris, Anoncas plu preĝada kant'.</p>	<p>4. Ekdormas ni post sun- subiro; gefratoj en la okcident' vekiĝas kun novtag- aspiro Vin glori per viv- elokvent'.</p>	
<p>5. So be it, Lord; Thy throne shall never, Like earth's proud empires, pass away: Thy kingdom stands, and grows fo- rever, Till all Thy creatures own Thy sway.</p>	<p>5. Ja estas, Dio ĉiopova, senlima Via regno, nin konduku al la tago nova en Via regno je la fin'!</p>	<p>5. Pereas regnoj. Tiel estu! Kaj sole staras via tron', Ke sole via regno restu Je fina tag' sub unu kron'.</p>	<p>5. Formortos mondaj im- perioj, sed Via regno kreskos plu. Al Vi sin cedos dinastioj, Venkinto estos vi, Jesu'!</p>	
...	...	...	...	...

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15), publikigita 1870.*

*Arg-130-255 (2008-11-08 14:47:39)*

*Information about the author can be found on the website [http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton\\_j.htm](http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton_j.htm).*

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-01-10.*

*Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)*

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.*

*Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)*

*Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland “Gotteslob”, in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Muziknoten findet sich auch auf der Heimseite [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).*

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro “Gotteslob” (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muziknotoj troveblas ankaŭ en la retejo [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).*

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (\*1892 – †1987).*

*Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)*

*Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro “Adoru”, eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperanto-Ligo (KELI), kanto numero 153.*